**7-a NoRo** 27. 12. 08 – 03. 01. 09

# La kvar elementoj

infana / gejunula programo



# Infana programo



**La kvar elementoj - improviza muzikteatro**
(Ines kaj Christoph Frank)
dimanĉe, lunde, merkrede kaj eble vendrede:
10.45 horo, ĵaŭde 16.15 horo

*Por pliaj informoj vidu paĝon 8*



**La kvar elementoj – luda posttagmezo**
30-a de decembro, 15a horo







*Por pliaj informoj vidu paĝon 8*



**danckurso** (Milena Propadovic)
plurfoje je la 13.15 horo

Por infanoj ek de 4 jaroj. Kiu volas kundanci partoprenu la faradon defajropilkoj. Ni volas danci kun vi 3 mem elpensitajn dancojn je Esperanto-muziko kaj inter alie lige al la temo FAJRO. Vi bezonasfajropilkojn (el la kurso vendrede) kaj eble fajrojupojn (por unu danco) kaj ĝenerale jupoj estus bonaj - sed ankaux sen tio ĉio vi estas bonvenaj partopreni. Ni kune prezentos la dancojn la lastan vesperon.



**akrobatika kurso** (Milena Propadovic)
**lunde, 16.15, marde 10.45, ĵaŭde 13.15, vendrede 17.00 horo**

Por infanoj ekde 5 jaroj. Milena montros al vi kelkajn simplajn akrobatikaĵojn kiujn ŝi mem lernis en lerneja kurso. Kunportu gimnastikajn vestaĵojn kaj laŭ eble gimnastikajn ŝuojn - eblas ankaŭ nudpieda partopreno. Kiu povas kunporti maldikan gimnastikan maton estas tre bonvena fari tion!



**Konstrui kajtojn** (Nancy Fontannaz)
dimanĉe, 9.00 horo

Nancy prezentas 2 modelojn de kajto : la kutiman formon, kaj unu modelon nomita « sledo ». Bonan flugon!



**konstrui raketveturilojn** (Bert Schumann)
lunde, 9.00 horo, ekde 6 jaroj (5-jaruloj kun gepatro)

(maksimume 16 partoprenantoj !)
Ni konstruas raketveturilojn kiuj veturas nur kun aerpremo. Post muntado kaj ekzercado vi povos konkuri.



**fajropilkoj** (Suna kaj Dalila Propadovic)
dimanĉe, 9.00 horo
Faritaj el ŝtofo kun paperoeno kaj flirtaj vostoj fajrosonaj, kiujn oni uzos dum la dancado kun Milena.Taŭgas por la infanoj kiuj volas kundanci kaj ankaŭ por aliaj.



**terornamaĵoj** (Betti Maul-Propadovic)
marde, 10.45 horo
El diversaj teroj kaj naturmaterialoj ni kuŝigas rondajn simetriajn bildojn. Tiujn ni antaŭ la dismetado fotos.



**paraŝutoj** (Mara Bartoli)
dimanĉe, 16.15 horo
Post ludoj kun granda paraŝuto ni konstruos etajn paraŝutojn kaj flugigos ilin



**kandelornamado** (Mara Bartoli, Marika Frense)
lunde, 16.15 horo, ekde 5 jaroj
Ornamado de vakskandeloj laŭ diversaj manieroj, ekzemple kun vakspladoj, per vaksfarboj kaj papertukoj por junuloj kaj infanoj ek de ses jaroj. Pli junaj infanoj nepre devus esti akompanigitaj de plenkreskulo por helpi.



**ŝminkado de infanoj** (Karine Berizzi kun helpantoj)
merkrede, 14.15 horo



**surpriza akvoarto** (Ines Frank)
vendrede, 9.00 horo, por infanoj ekde 4 jaroj,
Kia magio! Kelkaj punktoj kaj linioj sufiĉas por ricevi belegajn bildojn. Kiel? Venu kaj faru!



**kantado kun infanoj** (Betti Maul-Propadovic)
plurfoje je la 9a matene
Betti kantigos la infanojn laŭ REF-tradicio.



**kantoj kaj rimaĵoj** (Nan kaj Ulrich Matthias)
dimanĉe, 16.15 horo
Vi kaj viaj infanoj lernos kelkajn kantojn kaj rimaĵojn en Esperanto. Se vi konas pliajn, vi estas invitata prezenti ilin.



**piĵamaj rakontoj** - mallongaj rakontoj (Nicky Jansen)
ĉiu vespere krom silvestre je la 19.00 horo
Nicky ravigos nin antaŭ la vespera programo – por ĉiuj, kiuj aŭ volas frue enlitiĝi aŭ simple ĉeesti ŝiajn ĉarmajn rakontojn.

# infana/gejunula programskemo

| | Sabato 27-a de decembro | Dimanĉo **28**-a de decembro | Lundo **29**-a de decembro | Mardo **30**-a de decembro |
|---|---|---|---|---|
| 08.00 | | matenmanĝo | matenmanĝo | matenmanĝo |
| 9.00 |  |  Tero B **konstrui kajtojn** (Nancy)  Tero A **„fajropilkoj“** manlaboro (Suna kaj Dalila) |  **konstrui raketveturilojn** ĝis 16 partoprenantoj (Bert) Tero A |  **kantado kun infanoj** (Betti) Tero A |
| 10.45 | | **improviza muzika teatro „La kvar elementoj“** (Ines + Christoph)  Tero A+B | **improviza muzika teatro „La kvar elementoj“** (Ines + Christoph)  Tero A+B |  **„terornamaĵo“** (Betti) Tero A  **„akrobatiko“** (Milena) Aero |
| 12.30 | | tagmanĝo | tagmanĝo | tagmanĝo |
| 13.15 | | **„danckurso por infanoj“**  (Milena) Tero A | **„danckurso por infanoj“**  (Milena) Tero A | **„danckurso por infanoj“**  (Milena) Aero preparo de la posttagmeza festo (C+F + helpantoj) |
| 14.15 | |  **eksperimentoj pri aero** (Jannick) Aero |  **eksperimentoj pri fajro** (Jannick) Aero |   **15a h: La kvar elementoj – luda posttagmezo** Tero A+B   |
| 16.15 | |  **„paraŝutoj“** ludoj kaj konstruo (Mara) Tero A  **kantoj kaj rimaĵoj por infanetoj** (Nan kaj Ulrich) Akvo (E3) |  **„kandelornamado“** (Mara Bartoli, Marika Frense)  **„akrobatiko“** (Milena) Tero A | |
| 18.00 | vespermanĝo | vespermanĝo | vespermanĝo | vespermanĝo |
| 19.00 | | **„piĵama rakonto“** (Nicky aŭ Lydia) Akvo (E3) | **„piĵama rakonto“** ( Nicky aŭ Lydia) Akvo (E3) | **„piĵama rakonto“** ( Nicky aŭ Lydia) Akvo (E3) |
| 19.45 | **informoj** pri la programoj kaj la ĉiutagaj aferoj **Junulara televido** prezentiĝas |  **Lud-vespero** kunportu kelkajn ludilojn |   **Muzika vespero** |  **Münchhausen** - la vera kazo - teatra vespero (atentu: ekde 12 jaroj) |

| Merkredo<br>**31**-a de decembro | Ĵaŭdo<br>**01**-a de januaro | Vendredo<br>**02**-a de januaro | Sabato<br>03-a de januaro | |
|---|---|---|---|---|
| matenmanĝo | bufedo<br><br>10.00 Mallonga promeno<br><br>11.00 Pli longa promeno | matenmanĝo | matenmanĝo | 8.00 |
| **kantado kun infanoj**<br>(Betti) Tero A<br>*gejunuloj:*<br>**magia kubo** (Rubik-kubo)<br> (Eddy) Aero | | **kantado kun infanoj**<br>(Betti)<br>Tero A<br> **surpriza akvoarto**<br>(Ines) Aero<br><br>tuttaga ekskurso |  | 9.00 |
| **improviza muzika teatro**<br>**„La kvar elementoj“**<br>(Ines + Christoph)<br>Tero A+B | |  **eksperimentoj pri akvo**<br>(Jannick)<br>*nur, se estas bezonata:*<br>**impr. muzika teatro**<br>(Ines+Christoph)<br>Tero A+B | | 10.45 |
| tagmanĝo | tagmanĝo | tagmanĝo | | 12.30 |
| **„danckurso por infanoj“**<br>(Milena)<br>Tero A | **„akrobatiko“**<br>(Milena)<br>Tero A | <br>**vizito de la muzeo**<br>**"Hirthara Petro"**<br>sub la temo<br>"la kvar elementoj"<br>atentu la afiŝon!<br>**je la 17a:**<br>**ŝminkado de infanoj**<br>(Karine + helpantoj)<br>Tero B<br>**je la 17a:**<br>**„akrobatiko“**<br>Tero A (Milena) | | 13.15 |
| **ŝminkado de infanoj**<br>(Karine kun helpantoj)<br>ekde 8 jaroj<br> **La kvar elementoj en la kosmo**<br>(Bernard-Regis) Aero<br><br>**preparo de la silvestra balo**<br>sub la gvidado de<br>Betti kaj Erik<br>Pliaj helpantoj estas bonvenaj<br>Tero A+B | **gejunuloj**:<br>magia kubo - daŭrigo<br>(Eddy)<br><br>por la improviza teatro:<br>**ŝminkado**<br>(Karine + helpantoj)<br><br>**ĉefprovo:**<br>**improviza muzika teatro**<br>**„La kvar elementoj“**<br>(Ines + Christoph)<br>Tero A+B | | | 16.15 |
|  | vespermanĝo | vespermanĝo | | 18.00 |
| | **„piĵama rakonto“**<br>( Nicky aŭ Lydia)<br>Akvo (E3) | **„piĵama rakonto“**<br>( Nicky aŭ Lydia) Akvo (E3)<br>**ŝminkado de infanoj por la improviza teatro**<br>(Karine) Aero | | 19.00 |
| 19.30 **Silvestra festo**<br>inter alie<br>kvar elementaj surprizoj | <br>**Alejandro** koncertas | **adiaŭa vespero**<br>ĉifoje precipe kun prezentoj de la kursoj<br><br>inter alie la **improviza muzika teatro**<br><br>*se vi volas kontribui, anoncu vin ĉe Christoph* | | 19.45 |

# gejunula programo



ĉiutage je la 10.45
**“La kvar elementoj - improviza muzikteatro”**
(Ines kaj Christoph Frank)

*Por pliaj informoj vidu paĝo 8*



**La 4 elementoj en la kosmo** (Bernard-Regis Larue)
Merkrede, 14.15 horo
Ekscita momento: La ekspedicio sub la gvidado de ekspertisisto ekvojaĝas al la kosmo. Sia tasko: eltrovi, ĉu la tero estas la ununura loko, kiu ebligas al homo transvivi... Ĉu ie alie ekzistas akvo, fajro aŭ atmosfero? Pere de lumbildoj Bernard kaj sia teamo vagadas tra la kosmo kun la plej grava demando: se iam nia planedo stiras en naturkatastrofon, ĉu estas imageble por homoj, trovi novan mondon, kiu gastigos nin?



**Junulara televido “JT”** (Nils Klünder)
Kiel ĉe la laste noro ankaŭ ĉijare la junularo produktos ĉiutage filmojn - ni havas multajn teknikajn eblecojn. Bonvolu atentu, ke tio projekto estas dum granda parto de la tagoj kaj vi devus havi sufiĉe da libertempo por Junulara Televido.
Se vu nur volas spekti nin filmante sen kunhelpi, ne venu!
Sed se vi volas kunlabroi kaj havi plezuron per inventi kaj realigi filmojn, vi estas bonvena!



**Konstrui kajtojn** (Nancy Fontannaz)
dimanĉe, 9.00 horo
Nancy prezentas 2 modelojn de kajto: la kutiman formon, kaj unu modelon nomita « sledo ».
Bonan flugon!



**magia rubik-kubo** (Eddy van den Bosch)
merkrede, 9.00 horo, daŭrigo ĵaŭde, 14.15 horo
Eddy montros metodojn, solvi la faman rubikkubon
Favore kunportu vian propran kubon al la kurso.

**eksperimentoj** (Jannick Huet, instruistino pri fiziko kaj kemio)
Infanoj ekde 6 jaroj (necesas kelkaj junuloj aŭ gepatroj por helpi)



aero: dimanĉe, 14.15 horo

fajro: lunde, 14.15 horo





akvo: vendrede, 14.15 horo

Venu lerni kaj amuziĝi per aero, fajro kaj akvo.



**kandelornamado** (Mara Bartoli, Marika Frense)
lunde, 16.15 horo, ekde 5 jaroj
Ornamado de vakskandeloj laŭ diversaj manieroj, ekzemple kun vakspladoj, per vaksfarboj kaj papertukoj por junuloj kaj infanoj ek de ses jaroj. Pli junaj infanoj nepre devus esti akompanigitaj de plenkreskulo por helpi.



**ŝminkado de infanoj** (Karine Berizzi kun helpantoj)
merkrede kaj ĵaŭde, 14.15 horo
Se vi ŝatas ŝminki infanojn bonvolu direkti vin al Karine.

# Lingvokursoj



Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge ofertos lingvokursojn por diversaj niveloj.Por pliaj informoj rigardu la programon por la plenkreskuloj.

# Infanoj/gejunuloj



## La kvar elementoj – improviza muzikteatro

dimanĉe, lunde, merkrede kaj eble vendrede:
10.45 horo, ĵaŭde 16.15 horo
Ines kaj Christoph Frank

Ĉu la komuna agado - ĉu la lukto inter la 4 elementoj, ĉiukaze fascinas la observado de la naturelementoj.
Tiun grandiozan travivaĵon ni provu pere de movoj kaj sonoj imiti. Christoph Frank kunportos multajn (ankaŭ nekonatajn) muzikilojn, kiujn vi rajtas elprovi. Sed ankaŭ per viaj propraj muzikiloj vi eltrovos sonojn, kiuj taŭgas por elemento.
La interludo de aktoroj kaj orkestro donas imponajn impresojn. Ĉiuj estas bonvenaj, kiuj aŭ ŝatas eksperimenti per sonoj aŭ elkovri kiujn esprimojn homoj kapablas fari por personigi elementon.

Atentu: kvankam la teatro okazos ĉiutage, povas esti, ke niaj ekzercoj foje estas nur por unu aŭ du elementoj, tiam la aliaj havas liberan tempon.

Tamen ni petas, ke unue ĉiuj venu akurate.

---



## La kvar elementoj – luda posttagmezo

30-a de decembro, 15a horo



- ĉu vi iam provis, orajn sapvezikojn stiri al kastela lago sen difekti ilin ĉe la vitra montaro?



- ĉu vi volas ĉeesti la kandelfeston en lumhaveno?
- estu fajrobrigadisto kaj provu, estingi la fajron
- malkovru akvajn sonojn



- gvidu fajron de la fajromonto al via kavo

Entute atendas vin 13 ekscitaj stacioj.